

Kataluna Esperantisto

**NUMERO 325 (91)
KVINA EPOKO
JANUARO-MARTO
2003**

“Temas nur pri provizora momento”

Movada radiografio

Urĝa alvoko al solidareco

Nova tezo survojas

L'esperanto, rëquiem per una idea difunta?

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO  KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

**Kun la socio,
kontraŭ la milito, por la libero de esprimo**

Nia asocio deziras esti socie aktiva kaj nete malneŭtrala, kiam oni lezas la homajn kaj lingvajn rajtojn. Ĝi tial firme aliĝis al la vasta kontraŭmilita movado: ĝi aniĝis al la Platformo “Ni haltigu la militon” kune kun pli ol 200 aliaj asocioj, ĝi organizis kun la esperanto-fako de la barcelona Klubo de Amikoj de Unesko prelegon de Lluís Garcia, prezidanto de Kataluna Esperanto-Junularo, pri la fono de la konflikto, kaj ĝi spirite kunmarŝis en la grandioza manifestacio en Barcelono sub la granda afiŝo profesinivele kreita de Barcelona Esperanto-Kontaktejo. Bedaŭrinde tiaj paŝoj de miliono da homoj en la tuta mondo ŝajne ne sufiĉas por haltigi agresadon de Usono kaj ĝiaj komplcoj: necesos plu vigli.

Kvankam en tute aliaj proporcioj, la juĝa fermo de la eŭskalingva ĵurnalo *Euskaldunon Egunkaria*, en sufiĉe malregulaj cirkonstancoj, falas en similan rajto-lezadon. Tial multaj voĉoj laŭtis kontraŭ ĝi nialande, inter ili preskaŭ ĉiuj katalunlingvaj ĵurnaloj (inkluzive de la plej legataj) kaj la kolegio de ĵurnalistoj. Nia asembleo decidis subteni tiujn protestojn, kaj KEA subskribis la manifeston lanĉitan de diversaj gazetoj kaj politikaj partioj.

Estus bele imagi, ke similaj eventoj de nun ne plu okazos, sed nur supraĵa rigardo ĉirkaŭ ni evidentigas, ke multego ankoraŭ farendas. Nia deziro, kun via helpo, estas ĉiam stari fronte kaj rezolute. □



Redaktora saluto



Mi elkore salutas vin kiel nova redaktoro. Fakte *nova* ja iom malĝustas en ĉi tiu kunteksto: ekde la postmilita la refondiĝo de Kataluna Esperanto-Asocio kaj *Kataluna Esperantisto*, se ni esceptas la unuan redaktan periodon de Joan Ramon Guiñón (1982-1986), kun grandformata revuo kaj fajna kompostado, la redaktorecon vice interŝanĝas Llibert Puig kaj la subskribanto: mi en 87-88, li en 88-90, denove mi en 91-96, li refoje en 96-2002... kaj jen mi ree.

Sed agadoj feliĉe ne ĉiam estas unuopaj. Estas aparte dankindaj kelkaj konstantaj kunlaborantoj: Ramon Perera (esperantlingva reviziado, lingva angulo), Mateu Vic (katalunlingva reviziado), Darío Rodríguez (ret-angulo) kaj Ferriol Macip (kompostado).

Ŝanĝoj estas ŝancoj, eĉ se kiel ĉi-foje tiuj ŝanĝoj estas tre relativaj. Ioma renovigo povas milde skui nian dormeman lageton kaj instigi novajn kunlaborantojn. Ni deziras kredi, ke tio iom spronos aliajn en venontaj okazoj.

Ĉar oni lernas el pasintaj eraroj, ni aparte zorgos pri la aperdato de la revuo. Ni planas dissendi ĝin kvar-foje en la kuranta jaro. Redaktaj limdatoj estos la 15aj de majo, aŭgusto kaj novembro. Belus pli ofte eldoni ĝin, sed ni devas agnoski, kiaj estas niaj fortoj, kaj kia nia movado: la revuo devas speguli la realon kaj ne krei miraĝojn; bulteno informas pri aktivajoj, sed en si mem ne indas konsideri ĝin tia: agu (legu, skribu, prelegu, instru, partoprenu, informu) kaj tiam certe ĉi modesta eldonaĵo laŭ aspekto kaj aper-ritmo nepre kreskos kaj fariĝos pli ofta kaj okulkaresa.

Hektor Alos i Font

Sabaton, 29an de marto, 18a horo [nova dato!]

Marcos Salas
 "Turismaj vidindaĵoj de Ĉilio" (kun lumbildoj)

Sabaton, 12an aŭ 26an de aprilo, 18a horo

Manel Vinyals - Joaquim Marcoval
 Prezentado de la katalunlingva libro pri la 80-taga mondvojaĝo (kun lumbildoj kaj videofilmo)
 [tago konfirmenda: ni precizigos ĝin dum la marta prelego kaj en nia TTTejo; bv. telefoni al nia asocio, se tiuj informoj ne atingas vin]

Klubo de Amikoj de Unesko, Barcelono, Mallorca 207, pral.

Kovrilpaĝa foto: Pako Belmonte

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785
 Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL, Literatura Foiro, Heroldo, La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Litova Stelo, Ret-Info, Scienca Revuo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
 08200 SABADELL (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
 Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto-ct.org
 Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org
 Ret-listo: nia_listo@esperanto-ct.org

Kotizoj por la jaro 2002: Individua Abonanta Membro 25 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 50 eŭroj; Individua Dumviva Membro 500 eŭroj; Kolektiva Membro 50 eŭroj; Juna Membro 16 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; vicprezidanto: Joan Inglada; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Anna Casasús, Xavier Margais, Arnald Massanas.

Kontrola Komisiono: Sebastià Ribes, Òscar Puig, Xavier Murcia.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Mateu Vic; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Impres a/Presita ĉe: Pres Graf. Sabadell. Tel. 937 255 091
 Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Temas nur pri provizora momento

Viŝnja Branković

Dum mia ĉeesto en la lastjara jarkunveno de KEA ne estis malfacile rimarki, ke la asocio bezonas refreŝiĝon. Homoj simple ne plu emis transpreni taskojn, precipe la gvidajn. Verŝajne ili laciĝis, satiĝis, jam dum longa tempo ili agas, “ĉiuj jam faris ĉion”. Plej triste estis pensi, ke similajn situaciojn mi jam vidis, kaj imagi, ke simile jarkunvenas ne malmultaj kluboj aŭ asocioj tra la mondo. Bonŝance, la situacio limiĝas al pli aŭ malpli evoluintaj landoj.

Do ŝajnas, ke KEA bezonas ioman refreŝiĝon, plifortiĝon per enkonduko de novaj homoj, reformojn en la estrara kaj agada sistemoj.

Ekkorespondante antaŭsomere kun s-ro Llibert Puig (kasisto kaj provizora (?) sekretario kaj de KEA kaj de la Sabadell-a Centro) pro la kunlaboro rilate la kongreson en Majoroko, mi timis, ke mia kunlaboro ne signifas nur novan ŝarĝon sur liaj ŝultroj kiuj, ŝajnis al mi, jam portas tro multe kaj tro longe. La kongreso okazis sur la insulo Majoroko, kaj mi mem neniam aŭdis pri la ekzisto de iu esperantisto tie. La lokaj retpaĝoj (ordigendaj) baldaŭ vidigis al mi mian nescion, kaj tuj poste tion montris ankaŭ la libro de Xavier Margais pri “La esperanto-movado en Majoroko”. Nu, la “majorka esperantistaro” bezonas apartan ĉapitron kaj traktadon, ĉar ili ne nur ekzistas kaj ne nur viglas: ili ideas kaj kreas, laboras kaj laborigas, realigas. Ĉiuflanke, ĉiukampe, ĉiuforme. Ili laborigas esperantistojn, neesperantistojn, urbestraron, ĵurnalistojn... Dudeko da artikoloj pri la kongreso aperis en la insula gazetararo. Mi pensis pri la britaj esperantistoj, kies agado, ankaŭ ne sufiĉe konata ekster ilia insulo, lastjare tre impresis min. Ĉu eble estas afero de insuloj? Ĉiukaze, de la menciitaj insulanoj oni havas kion por lerni! Espereble KEA povu eluzi la freŝajn ventojn de la balearanoj, ankaŭ por ioma malŝarĝigo de la kontinentaj aktivuloj.

Mirigis min vidi speciale produktitajn porkongresajn sakojn kaj ĉemizojn en la landa kongreso kun nur sesdeko da kongresanoj. Kaj tri oficialajn kongresajn

gastojn! Kiu pagos ĉion, mi eksciis postkongrese. La perdo estis malpli granda ol antaŭvidite. KEA regas siajn membrojn per kvalita kongreso; per interesaj eksterlandaj gastoj oni allogas ankaŭ aliajn eksterlandanojn.

Tre bela kaj eleganta gesto. Tamen, la eksterlandanojn oni povus allogi ankaŭ per propraj fortoj: Manuel de Seabra, Abel Montagut, Vimala Devi, Hektor Alos, KTP, ktp... (t.e. tiuj, kiujn mi ankoraŭ ne konas) kaj nur per nomoj: Palmo de Majoroko, Barcelono... Gaudí, Picasso...

Unu oficiala eksterlanda gasto povus sufiĉi. Por la kaso, kompreneble.

La ĉiujaraj kongresoj kun pli granda ŝarĝo kaj respondeco de la loka organizanto kaj nur tegmenta, konsila, helpa, administra asisto de KEA (krom nur ioma financa helpo) povus esti utilaj por plifortigo de lokaj kluboj interne kaj enurbe, sed, ankaŭ, ĝenerale, por pligrandigo kaj plifortigo de la movado. Imageble ili povus varii inter pli grandaj aŭ gravaj kaj pli simplaj, depende de la forto de la konkreta organizanto.

Havi senpagan tranokteblon dumkongrese, kiel okazis en Sóller, estas eksportinda afero, por ebligi tion almenaŭ al junuloj. En Kroatio ekzemple, la kongresoj estas unutagej, sentranoktaj, pro nuntempa evitemo de tiuj kostoj. Estus dezirinda afero vidi ankaŭ tiel multajn junulojn kiel en Sóller, en la “maljunula” kongreso - kiel la landaj kongresoj estas konsiderataj de la kroata, itala, germana kaj aliaj junularoj. “Sed, ni helpas niajn junulojn”, klarigis al mi s-ro Puig.

“Helpo” kaj “solidareco” en Katalunio, des pli inter esperantistoj, ne estas foruzitaj, sed veraj kaj plensignifaj vortoj. Respondeca kaj konscia kunagado, ligiteco, unueco, iasenca familieco sentebblas larĝskale en lando, kie la urba estraro nomiĝas *ajuntament* kaj vere ŝajnas esti ĉiam proksima kaj utila al la civitanoj (kion oni de “politikistoj kaj burokratoj” preskaŭ jam ne plu esperas).

Viŝnja Branković profesie okupiĝas i.a. pri konsilado al esperanto-asocioj.

Ni bonŝancis gastigi ŝin dum du longetaj periodoj de la jaro 2002, kio permesis al ŝi bonan konatiĝon kun nialanda movado. Tial ni iom trouzis ŝian bonvolemon por peti diagnozon pri nia situacio.

**Temas pri asocio,
kiu havas ĉion
– unuavice valorajn,
kapablajn
kaj diligentajn
homojn**

Tamen, pro la profesia okupiteco, socia aktivado kaj bezonoj de la propra familio, la lokaj esperantistoj ŝajne ne trovas multajn okazojn por simple amikumi kaj amuziĝi en la kluboj.

Almenaŭ en Sabadell, unu laboran kunvenon kun estraranoj eblis fiksi nur post la naŭa vespere, ĉar ĝis tiam homoj ne liberis. Certe, ke en tiu kazo tute ne decas post laborplenega tago postuli porkluban laboron de tiuj homoj. Sed iuj en siaj tempotranĉaĵoj faras grandajn kaj gravajn aferojn por esperanto, aŭ simple, vojaĝas, uzas la lingvon en la hejmo aŭ alimaniere, do reale esperantumas. De tiaj homoj oni ne povas atendi senkondiĉajn ĉiusemajnajn klubumadojn, kiuj ĝis nun estis kutimaj. Ili meritas premiojn – ekzemple en la formo de speciale valoraj programoj, kiujn estraro regule preparu. Por tiaj programoj, kredeble, ili devigus sin veni al la klubo. Ŝajne iom da programoj povus veni de gastoj de la Barcelona Esperanto-Kontaktejo, kiun iniciatis Karles Berga (en Padilla, 196). Ĉar super lia librovendejo nun pretas kompleta loĝejeto kun gastoĉambro, kie dum la lasta jaro gastis deko da esperantistoj eĉ el tri kontinentoj. Necesus pli multe valorigi kaj ekspluati tiujn vizitojn. Mi mem lastjare, kun la amikino Danijela Poropat el Kroatio, preparis la lokon kaj lastaŭtune gvidis tie esperantajjn kursojn. Malantaŭ la montrofenestroj de la kontaktejo mi ankaŭ ekkonadis Katalunion kaj ĝian movadon. La librejo ŝajnis esti centro de kataluna Esperantujo kaj ke “la tuta mondo volas lerni esperanton”, ĉar konstante vizitadis nin esperantistoj aŭ interesitoj pri lernolibroj, ĉu el Barcelono, ĉu el Kolombio, ĉu rete el Brazilo... La movado ŝajnis esti tre interesa kaj vigla. Ĝi variis inter, ekzemple, promocio

de nova libro de Vimala Devi en la prestiĝa urba salono, nova Lingva Ateliero en Unesko-klubo, junularaj noktoj en la kafejo Badlands de Pako aŭ tute ekstermovada ĉeesto de diverslandaj junaj esperantistoj loĝantaj en iuj el la okupitaj domoj en Barcelono. Dum mia aŭtuna restado, (ĉirkaŭ unu monato kaj duono), mi kredas ke en la gazetaro averaĝe aperis po unu artikolo tage, konsiderante ankaŭ la artikolojn pri la majorka kongreso. Multan reeĥon provokis ankaŭ du paroj ĵus revenintaj de mondvojaĝoj. Iliaj spertoj certe estas tre ekspluatendaj, kaj por la prezentado en la kluboj kaj per malrekta informado pri esperanto. Ĝi estas tipo de programo simple preparebla kaj multfoje ripetebla en diversaj lokoj, kompreneble ĝis la limo, kiun fiksas la protagonistoj mem, kiuj, cetere, plenas de impresoj kaj havas bezonon transdoni ilin.

Nu, se iu la nunan staton de KEA konsideras kiel krizan, temas nur pri provizora momento.

Temas pri asocio, kiu havas ĉion – unuavice valorajn, kapablajn kaj diligentajn homojn, sciojn, ejojn, tradicion kaj eĉ monon. Necesus nur trovi novajn formojn kaj kanalojn, kiuj konvenas al nuna situacio kluba kaj socia.

Inter la ŝlosil-vortoj, kiujn mi rimarkis en Katalunio, estas ankaŭ “nokto” kaj “ateliero”. Do eble dum iu nokta ateliero en Sabadell, Badlands, BEK, Unesko, iu okupita domo... aŭ ĉie po iom eblos ellabori novajn kaj freŝajn projektojn. Kalkulu pri mia solidareco. □

Ret-Info

KEA fariĝis peranto de la ret-poŝta esperanta novaĵ-agentejo *Ret-Info*. Temas pri novspeca informilo, kiu kolektas novaĵojn kaj dissendas ilin ret-poŝte al siaj abonantoj. Ĝi tamen ne estas tipa retlisto, en kiu ofte multas fatraso kaj foje la anoj mutas, sed ĝi filtradas la mesaĝojn, i.a. el ĉ. 20 dissendolistoj kaj informejoj. La respondeca skipo fidindas: temas pri la homoj, kiuj dum 11 jaroj eldonis la gazeton *Eventoj*, kiu de post decembro 2002 ĉesigis sian aperadon. *Ret-Info* estas apenaŭ malhavebla por ĉiu aktiva movadano.

12-monata abono: 19 eŭroj ĉe KEA (ne nepre jarkomence)

Movada radiografio

Por havi pli realecan bildon de nia movado ni lanĉis etan enketon inter diversaj grupoj por ekscii, kion ili faris dum 2002. Jen skize la rezulto.

Badlands

Esperantaj kunvenoj ĉiumerkrede ekde la 20a ĝis la 2a nokte (junuloj kutime venas post la 22h30). Partoprenado neregula: de unu-du ĝis dekdu.

[informis: Pako Belmonte]

Barcelona Esperanto-Kontaktejo

Ĉ. 20 membroj-simpatiantoj

Kursoj:

Novembro 2002 (15a-17a kaj 22a-24a): intensiva kurso por komencantoj, 4 lernantoj, Zagrebida Metodo, prezo: 60 eŭroj

19a novembro - 20a decembro: kurso por progresantoj, foje semajne, 3 lernantoj per *Esperanto ne estas nur lingvo* (Zagreba Metodo), prezo: 33 eŭroj

Ekde januaro 2003: konversacia rondo, unufoje semajne, po 1h30, 3 lernantoj.

Kunvenoj ĉiumardaj, ekde la 20a kun averaĝe tri partoprenantoj.

Ekde januaro 2003: monata retbulteno sendata al centoj da adresoj.

Adreso: Padilla 196, 08013 Barcelono

TTT-ejo: www.geocities.com/classiclibres/

[informis: Karles Berga]

ILEI-Katalunio

Respondo al 21 informpetoj.

5 novaj aliĝintoj al la koresponda kurso.

1 ekzameniĝis kaj brile sukcesis.

[informis: Pedro Martín, Llibert Puig]

Majorka Esperantistaro

Ne okazis kursoj.

Ĉ. 20 kunvenoj: almenaŭ foje monate; pliaj por prepari la kongreson. Partoprenis 6-7 homoj.

Organizado de la kongreso, kun aparte: T-ĉemizoj; du ekspozicioj; video-filmeto; teatra deklamado de *La Balkanikoj*; kongreslibro.

Prezentado de la libro *El moviment esperantista a Mallorca* en pluraj urboj.

Zamenhofa tago (19 partoprenintoj).

Partopreno en: omaĝo al la respublikanoj murditaj de la faŝistoj kaj en "Diada de la Llengua" (Lingvo-Tago). En ambaŭ okazoj la gazetaro rimarkigis la esperantistan partoprenon.

TTT-ejo: marjorka.8m.com (6 novaj paĝoj en 2002)

[informis: Xavier Margais]

Centro de Esperanto Sabadell

90 membroj

Lernojaroj 2002/3: elementa kurso (novembro 2002- majo 2003): ĉiuĵaŭde, du-hora; 5 lernantoj; Zagrebida Metodo.

Estrar-kunvenoj: ĉiun duan aŭ trian monaton; averaĝe partoprenas 6 estraranoj el 7.

Aliaj aranĝoj: krom la deviga Asembleo, okazis du-tri prelegoj de eksterlandaj



c./ Padilla, 196



vizitantoj, du-tri societaj vespermanĝoj (kursfina kaj aliaj)

Denove partoprenis en la loka Libro-Foiro per propra budo disponigita de la Ŝparkaso Sabadell.

Instigas siajn membrojn partopreni la UK-on kaj la Katalunan Kongreson kaj faciligas ankaŭ la partoprenon en aliaj internaciaj aranĝoj.

Eldonaĵoj: du-tri cirkuleroj kaj unu 16-paĝa bulteno dum la jaro.

[informis: Llibert Puig]

Taragono

7 membroj

Ne okazis kursoj en 2002 (nek en la lernojaro 2001/2002 nek en 2002/2003)

Principe du kunvenoj monate (unuan mardon kaj trian vendredon) en kafejo "La Cantonada" kun partopreno de 2-3 homoj (15-40 jaraĝaj)

Bulteno: Taragona Esperantisto (2 numeroj en 2002, sed ne aperos en 2003; entute: 4 paĝoj)

TTT-ejo: www.esperanto-ct.org/tarragona

[informis: Ferran Marín]

Klubo de Amikoj de Unesko (Barcelono), Esperanto-Fako

Instruado (en la du lernojaroj 2001/2 kaj 2002/3):

Du malsamaj niveloj (po 4 lernantoj) laŭ la BEK-kurso de Denis Keefe. Po du horoj semajne.

Konversacia rondo: ĉiuĵaŭde (ekde la 20a), proksimume 4 homoj.

Lernojaro 2002/3: aldone, lingva ateliero: ses surlokaj partoprenantoj

(inkluzive de la gvidanto) plus unu foresta (reta); foje monate.

Agadoj:

Montrado de vidbendoj: 1 fojo (sabate matene); ĉ. 10 homoj

Montrado de lumbildoj pri esperanto (katalune): du sesioj, ĉ. 5 homoj.

Akceptado de 2 gasto-grupoj.

Zamenhof-festo: ĉ. 10 parto-prenintoj.

Kune kun KEA: tri prelegoj.

[informis: Ramon Perera]

Vilanova i la Geltú

5 membroj

Kursoj en la lernojaro 2001/2002:

Nivelo 1: septembro-julio; foje semajne; 3 komencintoj, 1 fininto; lernolibro: hispana traduko de la kurso de Germana Esperanto-Junularo fare de Joachim Boehmeke (www.boehmeke.de/ESPERANTO/Indekso.htm)

Nivelo 2: oktobro-junio; foje semajne; 5 komencintoj, 1 fininto; lernolibro: *Paŝoj al Plena Posedo* (kaj diversaj artikoloj)

Kurso en la lernojaro 2002/2003:

Nivelo 2: oktobro-junio; foje semajne; 5 komencintoj; lernolibro: *Ĉu vi aŭdis, ke...* (Katalin Smidéliusz)

Ne okazis apartaj membrokunvenoj.

La grupo partoprenis en la loka Foiro de Asocioj, dum kiu koncertis la ensemblo Kaj Tiel Plu.

TTTejo: www.esperanto-ct.org/vilanova (dum la jaro 2002 aldoniĝis ĉ. 12 novaj paĝoj, el kiu elstarindas www.esperanto-ct.org/vilanova/gxironakongreso/flavie.html - animita prezento de la mimado de Flavie Audivert dum la kongreso en Ĝirono)

[Informis: Joan Inglada]



NOVA POŝTKESTO
Kataluna Esperanto-Asocio
Apartat 1008 - 08200 SABADELL

Barcelona Esperanto-Kontaktejo

Post aktivega agado en aŭtuno per diversaj kursoj gviditaj de la gastinstruistino Viŝnja Brankoviĉ, Barcelona Esperanto-Kontaktejo lanĉis retbultenon. Kvankam ĝi celas plian oftecon, ĝi nuntempe aperas monate. Ĝia nula numero estis sendita januare kaj la numero unu, komence de februaro. Ĝin ricevas ĉ. 80 adresatoj.

La Bulteno enhavas ĉefe movadajn informojn en la kataluna, kvankam kelkaj informoj aperas en esperanto. Por aliĝi al ĝi, oni mesaĝu al kontaktejo@hotmail.com. Eblas ĝin konsulti ankaŭ en la TTTejo de KEA, kie ĝi estas afiŝita.

Vilaweb, la ĉefa kataluna ret-gazeto, informis pri ĝi en sia eldono de la 31a de januaro.

Kontraŭmilita agado

Lluís Garcia, prezidanto de KEJ, prelegis pri Irako en la Klubo de Amikoj de Unesko la 1an de februaro. Ĉeestis dudekkelke da homoj. La preleginto vizitis Irakon pasintjare en komuna solidara vojaĝo por konatiĝi kun la malfacilaĵoj travivataj de la iraka popolo pro dekjara blokado. La historia kaj ekonomia fonoj de la konflikto same kiel la impresoj de la vojaĝo plektis interesan fadenon, kiu starigis sufiĉe multajn demandojn far la partoprenintoj.

Samcele dudeko da esperantistoj kunmarŝis en la kontraŭmilita manifestacio en Barcelono, sabaton la 15an de februaro. Tre elstaris impona afiŝo porpaca kaj priesperanta farita de la Barcelona Esperanto-Kontaktejo. Laŭ nia scio aliaj verduloj manifestaciis en Lleida kaj Palma.

Prikatalunaj artikoloj

La decembraj numeroj de la revuoj *Monato* kaj *Etnismo* aperigis du artikolojn pri la kataluna lingvo. La magazino *Monato* en sia ĉiam interesa rubriko pri lingvoj eldonis kvar-paĝan artikolon de Hektor Alos. En ĝi la aŭtoro prezentas la staton de la kataluna en ties diversaj teritorioj, ĉefe sub Pireneoj. Kvankam li iom klarigas la dialektajn diferencojn, konsideritajn malgrandaj, li ĉefe akcentas pri socilingvistiko: kiel la kataluna baraktas en la nuna aŭtonomia kadro; kiel ĝi penas asimili la pasintan kaj nunan enmigraĵojn; kaj kiajn defiojn ĝi devos superi en la proksima estonto. La artikolo ne estas nepre optimisma aŭ



Foto: Pako Belmonte

pesimisma, malkiel tiu de Pau Climent publikigita en *Etnismo*. “La kataluna en la sudo” konsideras la situacion de la lingvo en Valencilando kiel “tragikan” kaj denuncas diversajn manovrojn por kontraŭstari ĝin en tiu lando: kiel oni kontraŭleĝe neglektas la instruadon de lernoobjekto en la kataluna en mezlernejo, kiel la loka televido bojkotas la dissendadon de la kataluniaj radio- kaj televidprogramoj aŭ kiel la valencia aŭtonoma registaro ĉikanas diversmaniere kaj kontraŭas la unuecon de la lingvo. Spite al tio, diversaj grupoj aktivas, sed la aŭtoro timas ilian cedon pro la premejoj, dum rimarkas iom-post-ioman neuziĝon de la kataluna.

Ambaŭ artikoloj, legeblaj en la TTT-ejo de KEA, estis trafe resumitaj de Pola Radio en sia elsendo de la 28a de januaro.

Tute alitone eble indas mencii, ĉar la koincido povas esti ne tute hazarda, ke aperis diversaj polemikaj artikoloj pri la kataluna en la revuo *La Ondo de Esperanto* laŭlonge de la jaro, pri tio ĉu la valencia estas aparta lingvo aŭ ĉu oni uzu ekskluzive hispanlingvajn loknomojn (rekte aŭ en esperanta vesto) por valenciaj urboj en esperanto-medio. Eblas konsulti la revuon ĉe ttt.esperanto.org/Ondo/Lode-old.htm.

Maresme

EIXAM (Entitats i Individus en Xarxa Alternativa del Maresme), la alternativa reto de la regiono Maresme, decidis laŭbezzone uzi la internacian lingvon. El tio rezultis la enkonduko en *Subversats*, la retbulteno de la



*Mendu ĝin ĉe KEA
aŭ en via kutima librovendejo*

grupo, de esperanta resume, jam aperinta laŭlonge de la ok numeroj de la jaro 2002. Pri la esperantigo okupiĝas JM Milla, mem kunredaktoro de la informilo. Eblas ĝin elŝuti el <http://es.groups.yahoo.com/group/maresmeactiu/files/subversats/>

Cassà de la Selva

La urba arkivo de Cassà de la Selva organizis decembre ekspozicion pri la loka kultura aktivulo Enric Genohér i Xirgu (1910-1988). Genohér estis homo kun ampleksaj kulturaj intereso, elstarinta kiel foto-amatoro. En tiu fako li partoprenis en plurdeko da ekspozicioj. Kiel kultura aktivulo, li estis redaktoro de loka gazeto, futbalisto, ekskursanto kaj esperantisto. Li kunfondis kaj prezidis “Flugiloj”-n, la antaŭmilitan esperanto-grupon de Cassà, kiu verŝajne estus organizinta la katalunan kongreson en 1938. Li estis ankaŭ la delegito de KEF en sia urbeto. Aktiva movadano antaŭmilite, li poste praktikadis esperanton nur private. Aparte interesa montriĝas lia korespondado, kiun li tenis ĝis sia lasta vivojaro: interalie konserviĝas dekoj da leteroj senditaj al 31 landoj, ĉar Genohér kopiadis ilin en kajereto. Por la historio de la kataluna movado, substrekindas lia korespondado kun Josep Garganta, kiu, kune kun diversaj kajeretoj kaj notoj, tre interese spegulas la periodon de la 1930aj jaroj. La tuta materialo en esperanto de Genohér, krom lia vasta kolekto de poŝtkartoj, estis transdonita al Josep Virgili, el Llagostera, kiu helpis la organizantojn de la ekspozicio tradukante diversajn materialojn el esperanto.

La magistrato de Cassà eldonis belan broŝuron okaze de ĉi tiu aranĝo. En ĝi, kompreneble, la fotista flanko de Genohér ĉefrolas, sed esperanto videble montras sin en la klarigoj kaj per foto de lia UEA-membrokarto de la jaro 1936.

Nova tezo survojas

Francesc Poblet, historiisto kaj antropologo, ĵus registris en la fakultato pri nuntempa historio de la Universitato de Barcelono sian doktoriĝan projekton titolitan “La esperanto-movado en Katalunio (1898-1939)”, gvidata de d-ino Teresa Abelló. Post la mejloŝtona laboro de Xavier Margais en Majorko, ni tre esperas, ke tiu studo plibonigos nian konon de la historio de esperanto en nia lando. Kiun ajn kontribuon, ĉu skriban ĉu parolan, li tre dankos. Eblas lin kontakti ĉe la retadreso francesc19@yahoo.com aŭ la telefono 635 522 740.

Glataj asembleoj

Dudek homoj partoprenis la du asembleojn en la Klubo de Amikoj de Unesko de Barcelono la 22an de februaro. Ambaŭ plej glatis: stariĝis kelkaj demandoj kaj petoj por precizigo, kaj alvenis kelkaj aldonaj proponoj tute akordaj kun la estraraj. Regis unuvoĉeco tamen ne pasiva.

La eksterordinara asembleo aprobis la proponojn de la plenumkomitato pri statutamedoj. Oni laŭdis la antaŭan statuton, celantan renovigon de la postenuloj, sed konstatis la neblon realigi tion, ĉar nur malmultaj homoj akceptas estraraniĝi. Tial oni enkondukis la eblecon de unu plia reelektado por la sama posteno (ĝis tri sinsekvaj mandatoj) kaj difinis la vicprezidantan postenon kiel nedevige provizeblan: oni substrekis, ke tio ne signifas rezigni pri la nuna tre aktiva vicprezidanto, sed nur la liberon ne elekti homon por tiu posteno, se iam mankos kandidatoj. Krome, oni enkondukis kelkajn alispecajn ŝanĝojn, kiel aludon al la universalaj deklaroj pri homaj kaj lingvaj rajtoj ene de la celoj de la asocio kaj la forigon de la kondiĉo scipovi esperanton por aliĝi al KEA.

Post la eksterordinara venis la ordinara asembleo. Oni aprobis la jarraporton kaj spezo-konton. Oni elektis Hektor Alos kiel novan sekretario (la posteno vakis dum 2002) kaj Xavier Margais kiel komitatano: tiel por la unua fojo post la milito, majorkano iĝas estrarano de KEA. La KEJ-ano Roger Prieto finis sian mandaton. Kiel agadoj por la kuranta jaro, oni parolis pri organizado de regulaj prelegoj kaj la lanĉo esperanto-fako en *Vilaweb*; por 2004 oni planas la festadon de la centjariĝo de esperanto en Katalunio kaj oni esploras la eblecon partopreni en forumo alternativa al Barcelono 2004.

Centjara jubileo

La katalunaj esperantistoj jubileos venontjare. En 1904 kreiĝis la unuaj esperanto-grupoj en rapida sinsekvo: Barcelona, Manresa, Cardona kaj novembre la unua asocio celanta tutlandecon: Aplec Esperantista de Catalunya en Ceret (Norda Katalunio). KEA prilaboras planon por la centjariĝo de la kataluna movado, kies skizon ni planas prezenti al vi venontnumere.

Esperanto-fako en Vilaweb

Vilaweb estas la plej fama kaj legata retbulteno en la kataluna, kun pli ol 400 000

legantoj monate. Ĝi posedas kelkdekojn da lokaj eldonoj: eĉ unu okcitana kaj alia eŭska. Ĝi inkluzivas ankaŭ ok fakajn sekciojn: beletra, geja, semajnfina, solidareca, sporta, teknologia, telekomunikada kaj universitata. Ilin prilaboras apartaj grupoj. Post la intereso vekiginta pro la mondvojaĝo - en kiu *Vilaweb* elstare kunlaboris - kaj la apero de la reta *La Bulteno* de Barcelona Esperanto-Kontaktejo, la retgazeto proponis al KEA krei memstaran esperantan fakon. Nia asocio tre ĝojas pri la propono, sed deziras certigi, ke ĝi povos regule ĝin plenumi kun sufiĉa kvalito por interesigi neesperantistan legantaron: temas ja pri retnovaĵoj kaj, sekve, ofte aktualigendaj. Se retŝaltita leganto deziras kunlabori en tiu iniciato, nepre kontaktu kea@esperanto-ct.org

Urĝa alvoko al solidareco

La kataluna filio de la esperanto-uzanta humanitara organizo *Espero* lanĉis kampanjon por helpi familion Zvirac. Temas pri antaŭmilite aktiva esperanto-familio (la tri gefiloj estas preskaŭ denaskaj esperantistoj). La patro, Fetah, estas kunfondinto de *Espero-Bosnio*. La patrino, Vasvija, grave malsaniĝis pro hepatito C. Por savi sian vivon kaj laŭeble rebonigi la sanstaton, ŝi urĝe bezonas dum 48 semajnoj kombinitan antivirusan terapion. Ĉio laŭ konsilo de la kuracistoj, inkluzive de injektaĵoj Pegasys 180 µg po unu semajne, kiujn produktas farmacia firmao Hoffmann-La Roche, Basel, Svislando. Unu injektaĵo (ampolo) kostas ĉirkaŭ 280 eŭrojn! Aliflanke, la familia apartamento detruigis dummilite, kaj urĝas ĝin ripari por ene ekloĝi aŭ riski ĝin perdi pro bosnia leĝo por redistribuo de neokupitaj loĝejoj.



De maldekstre:
Vasvija, Dino, Fetah kaj Dženita

Numa stato de ilia loĝejo

Espero-Katalunio konscias, ke temas nur pri unu inter centmiloj da tragedioj en Bosnio dum la lasta jardeko, tamen rememoras la humanitaran volontulan aktivecon de Fetah Zvirac, kiu helpis milojn da homoj en Bosnio. Tial ĝi petas sendi mondonacojn al sia konto ĉe Banc Sabadell: 0081-0346-21-0001048209

Espero ĝis nun sukcese okupiĝis pri diversaj rekonstruaj projektoj en Bosnio, kiel tiu de hospitalo en Teŝanj kaj akvodukto en Klokotnica.

www.espero.org

Du retlistoj

Ekzistas du retlistoj kunigantaj la katalunajn esperantistojn. La plej aktiva estas nia listo@esperanto-ct.org, kiu arigas ĉ. 60 homojn interŝanĝantajn ĉ. 50-60 mesaĝojn monate. Ĝi iel estas la "oficiala" listo kaj tie aperas la plej freŝaj asociaj informoj. Apud ĝi ekzistas esperpentu@yahoo.com, en kiu, pravigante sian nomon, oni ofte interŝanĝas malpli seriozajn aferojn. Membras en ĝi 15 homoj mesaĝantaj entute dekkelkajn fojojn monate.

Por aliĝi al la unua, oni sendu mesaĝon al ties listestro (o.puig@esperanto-ct.org); por la dua la aliĝo estas tute libera (es.groups.yahoo.com/group/esperpentu/).

Interreta rubriko

*Darío Rodríguez,
senlaca interret-krozanto
kaj aktiva membro de
nia listo@esperanto-ct.org,
regule prezentos interesajn
retejojn kaj utilaĵojn*

Interreto alportis novan vivon al nia lingvo. Dum la kluba vivo stagnas, kontraŭe la interkomunikado de esperantistoj per la reto brile kreskas. Ĉi tiu rubriko celas informi tiujn havantajn aliron al Interreto, sed ankaŭ legantojn, kiuj ne posedas komputilon: eble ĝi puŝos vin aĉeti komputilon kaj partopreni en la viglaj virtualaj esperantejoj.

Nepre vizitendas la portalo de KEA: www.esperanto-ct.org/. La paĝaro estas dulingva kaj en ĝi i. a. troviĝas ligiloj al aliaj esperantaj retpaĝoj de grupoj de la Katalunlingvaj Landoj: Majorko, Sabadell, Tarragona kaj Vilanova i la Geltrú. Ankaŭ estas ligiloj al kurso kaj esperanto-kataluna vortaro kaj al aliaj interesaj paĝoj, ekzemple al tiu de la ensemblo Kaj Tiel Plu kaj al la bulteno de Barcelona Esperanto-Kontaktejo. Krome, aperas versio en PDF-formato de *Kataluna Esperantisto*.

Tre rekomendindas viziti la retpaĝon de la Esperanto-Librejo: www.esperanto.nu/eLibrejo/. En ĝi eblas trovi 256 elektronikajn librojn en esperanto, libere kaj senpage elŝuteblaj, kun entute 36 312 paĝoj. Ili legeblas per la programoj Adobe Acrobat aŭ eBookReader, haveblaj de tiu paĝo mem. Jam oni elŝutis 87 750 ekzemplerojn ekde la starigo de ĉi servo.

La lastatempa sensacio en la esperanta reto estas la apero de la brazila portalo *Ĝangalo*, www.gxangalo.com, kun freŝaj internaciaj politikaj novaĵoj, raportoj priesperantaj, interesaj ligiloj kaj eĉ fako, ĉe kiu oni povas amuziĝi per pluraj ludoj en esperanto.

Antaŭnelonge aperis ankaŭ la portalo www.lernu.net. Temas pri reta kursejo, en kiu oni trovas ligilojn al multaj esperanto-kursoj en diversaj lingvoj, al vortaroj, al esperanto-informiloj, kaj ankaŭ sonarkivoj kun voĉlegitaj rakontoj por ekzerciĝi pri aŭda kompreno de esperanto.

Programo ebliganta tajpi la ĉapelitajn literojn estas elŝutebla el la adreso www.esperanto.mv.ru/Ek/. Temas pri Ek (Esperanta Klavaro), funkcia sur ĉiuj versioj de Windows. La klarigoj por la uzado troviĝas en la programo mem.

Darío Rodríguez

La TTTejo de KEA: utila iniciato

Certe ne malmultaj miros pri tio, ke la revuo tre plenas de novaĵoj pri Interreto: eble iom tro. Ĉu vere ĝi fariĝis tiel grava kaj esenca? Tio estas ne nur demando, kiun certe starigas al si komputil-laikoj, sed temo pri kiu devas atenti ĉefe tiuj, kiuj la tutan tagon pasigas antaŭ ĉi tiu nova totemo.

Ekzistas programoj por analizi la “vizitojn” al TTTejo. Kontrolinte la statistikojn por la jaro 2002, la rezultoj montriĝas tre atentindaj: en la unua trimestro, nia TTTejo ricevis ĉ. 10-15 vizitojn tage; de aprilo ĝis julio, ili fariĝis 20-25; kaj ekde aŭgusto ili fariĝis pli ol 30, kun maksimumo en novembro (38), ĉefe en la tagoj tuj post la kongreso. (Por fakuloj, informindas, ke “vizito” egalas elŝuton de pluraj paĝoj kaj bildoj; se paroli pri *trafoj* tage, temus pri plurcentoj, kun novembra maksimumo de 800.)

Eblas kontroli ankaŭ kiuj partoj plej popularas: multe pli vizitataj estas la katalunlingvaj paĝoj; poste tiuj de Vilanova (la vortaro efikas kvazaŭ magneto) kaj Tarragona; nur kvaraloke alvenas la esperantlingvaj dosieroj.

Plie, la statistikoj informas pri la deveno de la vizitantoj: ekzemple, en januaro 2003 dek vizitoj alvenis el la paĝo listiganta ĉiujn aranĝojn kontraŭ la milito en Irako, kie estis anoncita ankaŭ la prelego de Lluís García. Kaj se homo nin atingis pro demando al ret-serĉilo, eblas eltiri ĝin: interesas scii, ke oni serĉis, ekz-e, biografion de Zamenhof (ĝi mankas en nia TTTejo), aŭ informojn pri biodiverseco (ni multe parolas pri *lingva* diverseco). Tio povus nin helpi orienti nian informadon.

Resume, videblas, ke la reto fariĝas pli kaj pli grava informilo, kaj ke niaj retpaĝoj utilas por informi, ĉar ilin konsultas kelkaj centoj da homoj ĉiumonate. Gravas do teni la informojn ĝisdatajn kaj enkonduki pliajn dosierojn por provizi la bezonojn de la vizitantoj.

L'esperanto, rèquiem per una idea difunta?

Moisès de Pablo

Alguns consideren l'esperanto com quelcom mort, desfasat, anacrònic. Potser ho és. Però em resisteixo a creure-ho. El nostre savi més valencià i universal alhora, Joan Fuster, deia als seus diaris personals que no entenia com una idea – en aquest cas, parlava del comunisme – es podia desacreditar o desaparèixer perquè s'hagués aplicat malament a la Unió Soviètica. La idea és això, una idea. Tan vàlida avui com ho va ser 100 anys enrera. Almenys en la seva plasmació teòrica.

En aquest cas, els inicis de l'esperanto van units a uns valors ètics i morals. Els lligams entre l'obrerisme, sigui de base anarquista o socialista, i aquest idioma són notoris. Com també ho és la base republicana, laica i reformadora dels seus practicants. El *gènere humà* dels marxistes, la internacional de pobles, necessitava un idioma comú, i aquest va passar a ser aviat l'esperanto.

Al nostre país va experimentar un floriment meravellós a l'època mai prou reivindicada

Aquest article va merèixer una menció honorífica en el Premi Delfi Dalmau

Continua a la pàgina següent

Esti aŭ ne esti, jen la demando

En esperanto *est-* estas grava radiko; por konvinkiĝi sufiĉas legi la unuan kompletan frazon en la Ekzercaro de la Fundamento: “Leono estas besto”. Eĉ pli, la unua frazo iam publikigita en esperanto tekstas jene: “Patro nia, kiu estas en la ĉielo, sankta estu via nomo...”. Tiu ĉi frazo aperas en la publikaĵo de D-ro Esperanto, aperinta en la jaro 1887a, konita neformale sub la nomo “Unua libro”.

En la kataluna lingvo ekzistas du verboj, *ĉs* kaj *estar*, ĝenerale tradukeblaj per *esti*. Ĉar la cititaj verboj estas tre uzataj en la kataluna, foje *esti* estas **tro** uzata en esperanto. Io tia havas du malavantaĝojn: unuflanke komunikado fariĝas ripetiĝema, aliflanke oni neglektas aliajn rimedojn verŝajne pli elegantajn aŭ pli internaciajn.

Ni montru tion per ekzemploj: Ni komparu “Les eines són al calaix” kun “La kraĵono kuŝas sur la fenestro”; vidu, ke ne temas pri traduko sed pri uzo de malsamaj rimedoj en

similaj situacioj. Ankoraŭ alia paro: “Vam trobar-los sota el pont: estaven allí, armats” kaj “Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj”. Notu, ke mi celas verki nek traktaton nek lernilon, nur porti vian rigardon sur aspekton de la lingvo, pri kiu oni ĝenerale ne tre atentis.

Novaj ekzemploj helpas montri, ke lingvoj ne estas tiel simplaj aferoj: “Vaig estar un mes fora del meu país” – “Li scias, kie la kankroj pasigas la vintron”. Alia duo: “Tant hi estaràs, que te'n treuran” – “Agrable estas gasto, se ne longe li restas”.

Ni finu dirante, ke ĉiuj ekzemploj estis prenitaj el konataj vortaroj (Fabra, Enciclopèdia Catalana, PIV). Kaj kiel adiaŭo: “Ĝs boig, que fa aquestes coses” – “Li frenezas de senespera amo”.

Ramon Perera

Ramon Perera regule prezentos iom neglektitajn tiklajn aspektojn de la lingvo

Es configura una consciència ecològica i antiglobalitzadora de base, sobretot, jove

de la II República. Els intel·lectuals, els obrers, la gent que l'estudiava sabia que l'idioma és un arma del nacionalisme, un recurs de la intransigència (ho hem vist, sense anar més lluny, a les guerres balcàniques). Precisament, ¿per què no parlar una llengua científica, una barreja d'idiomes llatins, anglosaxons i préstecs de llengües eslaves, amb formes semites i africanes, un llenguatge fàcil d'aprendre i que no fos una imposició, un domini d'un idioma damunt un altre?

En aquest sentit, *La Vanguardia* publicava el 20 de juny del 2001 que la meitat dels 6800 idiomes que es parlen en el món són en perill d'extinció. La dada és colpidora. Quan una llengua desapareix, una part de nosaltres mort amb ella. Perquè la idea d'home i de dona perd una part del seu significat. Diu l'escriptor Muñoz Molina (*El País Semanal*, 13 de maig, 2001) que "cada idioma es el mundo, el universo entero, con su geología y su botánica, con su catálogo completo de los cuerpos celestes". Per això no hi ha res més meravellós que endinsar-se en un idioma desconegut: "Aprender una lengua es descubrir la amplitud de todo lo que se ignora, los matices que nunca se llegará a poseer, la proliferación selvática de las palabras que desconocemos".

Els catalans sabem el que significa viure amb la amenaça d'un genocidi cultural. Des d'aquesta perspectiva, es valora molt una llengua que no neix com a imposició, sinó com a instrument, com una eina de llibertat i de culturització.

L'esperanto va aparèixer en una època convulsa, la del colonialisme i la Segona Revolució Industrial, però amarada de bones intencions. En aquest món del doctor Jekyll i mister Hyde es van configurar les ideologies principals del segle XX: el capitalisme, el marxisme i l'anarquisme. L'home i la dona van tractar de trobar respostes a un món que no era tan meravellós com es creia. La ciència i la racionalitat pretenien fer-nos més lliures (aquesta va ser la intenció de Freud i els seus epígons, com abans ho van intentar els socialistes utòpics des de l'economia, on van deixar el seu llegat als cooperativistes).

No oblidem que els ideals de progrés, república, una societat més justa i un estat de serveis va ser el lema dels països del Nou Món (encara figura com a emblema a la bandera brasilera: "ordem e progresso"). Malauradament, el segle XX ha significat el triomf de l'irracional, de les doctrines totalitàries de base messiànica.

Si la dècada dels 80 del segle passat va viure l'eclosió del *yupisme* (amb uns valors equívocs i, sobretot, egoistes, que a hores d'ara encara patim), la època actual tampoc és gaire engrescadora. La societat del segle XXI és més desigual que 15-20 anys enrera. El primer món pateix els efectes d'aquest liberalisme de màniga ample: acomiadaments en massa, estrès, empitjorament de les condicions laborals, deserció social, pèrdua de qualitat mediambiental, afebliment de les classes mitjanes. Però no cal ser catastrofistes. Hi ha motius per l'esperança. Es configura una consciència ecològica i antiglobalitzadora de base, sobretot, jove. En ella hi conflueixen els ecologistes, l'esquerra alternativa i antisistema, l'anarquisme i els marxistes, fins a les organitzacions juvenils catòliques. El que demanen és, essencialment, recuperar la noció de justícia.

Avui tenim una *lingua franca*, l'anglès. Però cal saber que s'ha imposat per les armes i per la puixança econòmica dels Estats Units i que hi ha altres solucions més tolerants. I, sobretot, que han nascut del desig dels homes de trobar punts de contacte. La racionalitat de l'esperanto radica en que, a través d'ell, un entusiasta de la lingüística podia i pot aprofundir en els mecanismes semàntics de, al menys, 10 o 12 llengües. Que la seva visió del món és un poliedre infinit. I que, en definitiva, hom creix moral i mentalment, a través del seu estudi. L'esperanto és una prova que el llenguatge no és violent o totalitari; és, simplement, una visió particular del cosmos.

L'herència d'aquest idioma creat el 1887 per l'oculista polonès Zamenhof, amb la intenció que totes les llengües del món fossin, en certa manera, presents, és un missatge de racionalitat i de respecte pel bé més preuat del gènere humà: el llenguatge, la paraula. Només per això, val la pena tenir-lo en compte.

El neocapitalisme es caracteritza per "concedir-nos" parcel·les de llibertat que solen ser façanes. El terreny del políticament correcte s'acaba en la paraula, no en l'acte. Potser sí que el sistema ha assumit quotes de llibertat àmplies, no cal negar-ho, però en queden moltes per reinvidicar. L'exemple dels esperantistes, que al llarg de dècades han volgut millorar com a éssers humans, s'afegeix a una llarga llista d'oblits d'amnèsies col·lectives que caldria vèncer. El seu llegat no està tan periclitat com alguns voldrien. Perquè rau al bell mig del territori, esperem que inesgotable, de idees duradores que no moren mai. □

Porto Alegre, 2003.01.25

